


# Mansignado por Esperanto

Enkonduko	2
Aplikado al lingva lernado	4
Aplikado al lernado de Esperanto	5
Simplaj frazoj	7
Pli komplikaj frazoj	9
Avantaĝoj de tiu helpilo	10
Kion mi petas al vi?	14
Literaturo	15

## Enkonduko

En muzikinstruado, oni kutime uzas tute specialajn helpilojn, kiuj laŭ mia scio ne ekzistas en instruado de aliaj fakoj. La plej konata el ili estas la lernado kaj instruado de notoj pere de *silaboj*, kiel: *do, re, mi, fa, so, la, ti*.<sup>1</sup>



do	re	mi	fa	so	la	ti	do'
1	2	3	4	5	6	7	1'

Tamen ekzistas ankaŭ *manaj signoj* ekzemple tiuj, kiuj reprezentas taktojn (oni preskaŭ senkonscie faras tion per la mano aŭ piedo aŭskultante muzikon), aŭ, pli komplike, taktojn ene de mezuro (kion faras orkestraj kaj ĥoraj dirigentoj)<sup>2</sup>.

La ĉefa trajto de tiaj helpiloj estas, ke ili estas uzataj **samtempe** kun la kantado aŭ ludado. Do, ne temas pri posta analizado (ekzemple, mi kantas melodion, kaj poste klarigas, ke temis pri la unua noto de la gamo, poste la dua, poste la tria...), sed ja temas pri *samtempa analizado* de tio, kion la muzikisto kantas aŭ ludas.

Temas pri tre bona helpilo, ĉar ĝi devigas la lernanton ĉiam analizi kaj esprimi la rezulton de tiu analizado dum la ludado<sup>3</sup>.

Tiuj helpiloj ĉiam baziĝas sur sistemo, kiu havas malmultajn elementojn, uzante simplajn signojn.

Tiaj helpiloj havas multajn avantaĝojn:

- La rilato inter la signo (voĉa, skriba aŭ gesta) kaj la lernenda koncepto multe helpas la lernanton. La lernanto koncentriĝas sur tiu grava lernenda parto, ĉar la helpilo nepre pensigas lin pri ĝi. Kutime, averaĝa lernanto ja komprenas teorion, sed li ne kapablas apliki ĝin dum li agas, li bezonas pli da tempo. Pro tio, tia helpilo estas ege utila: ĝi rapidigas la menson de la lernanto, ĉar ĝi devigas lin apliki la teorion rapide, dum li agas.
- La rilato estas ambaŭdirekta: Post kelka tempo de praktikado, la sono vekas la silabon, kaj la silabo vekas la sonon.
- La lernanto kapablas kontroli sian propran lernadon, ĉar li povas scii, ĉu la rezulto kongruas kun la signo.

<sup>1</sup> Atentu: tiu silaba sistemo funkcias alimaniere en latinidaj landoj, kie tiuj silaboj reprezentas ne la funkcion de la noto ene de la gamo (relativa solfeĝo), sed la noton mem (absoluta solfeĝo), kaj, tiamaniere, ĝi ekvivalentas la internacian sistemon bazita sur literoj: A, B, C, D, E, F, G.

<sup>2</sup> En kelkaj landoj, muzikinstruistoj uzas ankaŭ manajn signojn, kiuj havas la saman signifon kiel la notsilaboj. Sed estas grava diferenco rilate al la aliaj sistemoj: laŭ mia scio, nur la instruisto uzas ĝin. Do, la lernantoj havas nur pasivan scion pri tiuj signoj.

<sup>3</sup> Rimarku, ke ĉiu silabo aŭ mansigno enhavas amason da informo, kaj ke la lernanto devas nepre scii kantante notojn, ĉu iu ajn noto estas la kvina noto de la gamo, la kvara, la sesa, aŭ, mansignante, ĉu tiu noto estas en la dua takto de la mezuro, aŭ en la tria, ktp. Ne malofte lernanto devas kaj kanti la notsilabojn kaj samtempe mansigni la taktojn ene de mezuro.

- La instruisto samtempe kontrolas tion, kion pensas la lernanto, ne nur la rezulton. Eĉ estas relative facile kontroli la lernantojn grupe (se ĉiuj kantas silabon "re" kaj lernanto kantas silabon "fa", oni tuj rimarkas tion; se lernanto mansignas malsame ol ĉiuj aliaj, oni tuj rimarkas tion).

Sed, kompreneble, kiel ĉiu helpilo, ĝi havas ankaŭ malavantaĝojn:

- Rimarkindas, ke tiu helpilo, same kiel ĉiu nova ilo, postulas de la lernanto iom da investa tempo por lerni ĝian funkciadon. En la unua fazo, tiaj helpiloj pli "ĝenas" ol helpas lernantojn. Do, se oni ne superpasas sukcese tiun unuan fazon, kiam la *helpilo* estas ĉefe *devigilo*, ĝi tute ne helpas. Tio signifas, ke ĝi estas postulema helpilo: tute ne efikas iomete uzi ĝin, aŭ uzi ĝin nur de tempo al tempo. Ĝi utilas nur, kiam ĝi estas *sisteme uzata*.

- Ĝi devas esti tre simpla: malmultaj signoj facile realigeblaj (ĝi ne taŭgas por tro komplikaj aferoj).

- Temas pri tiel potenca helpilo, ke ĝi agas kiel *forta lampo*, kiu tre bone lumigas unu aspekton, sed tio, kio restas en *ombro*, povas malaperi de la lernado kaj instruado. La instruisto devas zorgi speciale pri tiuj aspektoj, kiujn ne klarigas la helpilo.

- Temas pri tiel potenca helpilo, ke la instruisto ankaŭ devas al kutimigi la lernanton, survivi sen ĝi. Do, ni parolas pri provizora helpilo, kiu devas havi komencdaton kaj findaton, kaj la instruisto devas konscii pri tio, kaj bone plani, kiam komenci ĝian aplikadon, kaj kiam la lernantoj devas al kutimiĝi al la senhelpila agado. Tiam, la helpilo jam plenumis sian taskon, kaj ĝi devas esti, iom-post-iom forlasita.

## Aplikado al lingva lernado

Por averaĝa lernanto, la rilato inter gramatika kono kaj parola lingvo estas malpli forta ol la rilato inter gramatika kono kaj skriba lingvo. Skribante (se ne temas pri reta skribbabilado) oni havas pli da tempo por pensi pri gramatiko, eĉ por revizii tion, kio jam estas skribita, kaj pro tio, la skriba nivelo kutime estas multe pli alta ol la parola nivelo. Ofte, nur la delongege lernitaj gramatikaĵoj finfine eniras en la cerbon de la lernanto, ebligante lin paroli flue kaj senerare. Dum la longa tempo, kiam tiu gramatikaĵo ankoraŭ ne iĝis *natura leĝo* en la nekonscia cerboparto de la parolanto, li senespere eraras. Certe, gramatikaj reguloj iĝas naturaj leĝoj kaj ili funkcias aŭtomate (tion ni jam spertas parolante la denaskan lingvon), sed, kiam temas pri novaj lingvoj eklernitaj kiam ni jam estas plenkreskuloj, oni devas demandi sin mem: ĉu ni havas tiom da tempo? Ni havas nek la tempon, nek la etoson, kiun trovas bebo, nek lian plastan cerbon. Ĉikaze, la strategio devas esti malsama: tia lernanto devas uzi teoriajn helpilojn por lerni novan lingvon. Instruistoj povas senfine diskuti pri kiam kaj kiel enkonduki novajn teoriaĵojn, sed ni ĉiuj scias, ke la lernanto pli frue aŭ pli malfrue bezonos ilin. Tamen, ne estas bona ideo, ke teorio helpu lin, nur kiam li havas skribilon enmane. Se iu teoriaĵo estas utila, ĝi devas helpi ĉefe kiam oni parolas, ĉar, se oni parolas bone, oni certe bone skribos (tamen, la malo ne veras)<sup>4</sup>. Similaj helpiloj kiel tiuj kiujn uzas muzikistoj, se ili estas bone planitaj, povas helpi ankaŭ la lingvan lernadon, ĉar ili devigas la lernanton apliki regulojn *dum* li parolas. Ne temas nur pri pasiva komprenado de gramatikaj reguloj, ĉar se oni ne kapablas apliki ilin sufiĉe rapide *dum* sia parolado, ili simple ne efikas. Tiuj helpiloj rapidigas la aplikadon de la reguloj dum oni parolas kaj tio ebligas seneraran paroladon *dum* la lernado, ĝis la momento, kiam tiuj reguloj jam enhejmiĝas en la menso kaj oni ja rajtas forigi tiajn helpilojn. Rimarku la diferencon: sen tia helpilo, oni eraras *dum* la longa tempo ĝis kiam la reguloj instaliĝas kiel aŭtomacio en nia cerbo; pere de ĝia helpo, la fina celo estas la sama, sed *dume*, oni malmulte eraras<sup>5</sup>.

Se oni konsideras, ke estas lingva aspekto, pri kiu, la lernanto nepre devas konscii por bone regi la lingvon, eblas enkonduki taŭgan helpilon. Sed, kompreneble, tiu helpilo devas esti *mansigna* (ĉar, pro evidentaj kialoj, oni ne povas uzi voĉan helpilon dum parolado).

---

<sup>4</sup> En multaj lingvoj, kelkaj gramatikaĵoj estas utilaj nur por ortografiaj kialoj. Ĉikaze, tio ne rilatas al la parolado kaj estas logike, ke tiuj helpiloj utilas nur kiam ni havas skribilon enmane. Pro tio, en multaj lingvoj eblas bone paroli kaj skribi kun ortografiaj eraroj. Tiajn malfacilaĵojn Esperanto ne konas.

<sup>5</sup> Kompreneble, ne eblas lerni senerare, sed estas grava diferenco: pere de tiu helpilo, la lernanto mem konscias pri siaj eraroj kaj kapablas korekti ilin tuj (do, ni lernigas la lernanton pri sia propra instruado).

## Aplikado al lernado de Esperanto

Ĉar unu el la plej gravaj malfacilaĵoj de nia lingvo estas la regado de la akuzativo, mi unue elpensis helpilon por solvi tiun problemon. La unua aliro ne estis sukcesa, ĉar mi pensis pri manaj signoj, kiuj analizis la frazpartojn<sup>6</sup> laŭ ilia frazrolo<sup>7</sup> (subjekto, verbo kaj rekta objekto en miaj unuaj provoj). Sed baldaŭ mi rimarkis, ke estas multaj frazroj (subjekto, predikato<sup>8</sup>, objekto, adjekto<sup>9</sup>, vokativo, epiteto, suplemento, subjekta kaj objekta predikativo...) kaj tiu ideala helpilo, kiu reprezentus ĉiujn frazrolojn devus havi amason da signoj kaj estus tro malfacile regebla. Krome, la celo ne estas fari kompletan analizon de la frazo, sed la minimuman analizon, kiu helpas, permesos kaj postulos bonan lingvan regadon. Neniam tia helpilo povas esti komplika, ĉar tio ege malhelpus ĝian aplikadon.

Do, se la frazroj de frazpartoj ne povas esti la bazo de tiu helpilo, mi devis serĉi alian fundon, kiu finfine estis la *rolmontriloj* de la lingvo. La rolmontriloj estas la lingvaj rimedoj uzataj por montri la frazrolojn de la lingvo<sup>10</sup>. En Esperanto ekzistas malpli da rolmontriloj ol frazroj, do, tio ebligas sistemon kun malmultaj elementoj.

Per tiuj rolmontriloj oni povas klasifiki la frazpartojn laŭ la grupoj montritaj en la sekva tabelo.

---

<sup>6</sup> La gramatikaj konceptoj uzataj en ĉi tiu artikolo baziĝas sur la *Detala Gramatiko de Esperanto* de Bertilo Wennergren (lernu!, 2010). Kiel la aŭtoro mem jam avertas en la Enkonduko de tiu ĉi libro (p.13): "La klarigoj estas vortigitaj el la vidpunkto de la Esperanta gramatiko. En aliaj gramatikoj (pri Esperanto aŭ pri aliaj lingvoj) la terminoj povas esti uzataj en iom aliaj manieroj". Frazparto estas (p.22) "vorto aŭ grupo de vortoj, kiuj rolas kiel unuo en frazo" (en aliaj gramatikoj oni nomas tion *sintagmo*).

<sup>7</sup> Sintaksa funkcio de la frazparto (aŭ sintagmo). "La predikato estas la centro de la frazo. Ĉiuj aliaj (ĉefaj) partoj de la frazo rilatas en diversaj manieroj al la predikato. Ili ludas diversajn **frazrolojn**, ekz. subjekto, objekto, adjekto, vokativo, predikativo." (Wennergren 2010: 23). Fakte, la sama aŭtoro en alia verko (Wennergren 2005: 657) uzas nur la vorton *predikato* en vortareto kaj nur por rilati ĝin al la vorto *ĉefverbo*.

<sup>8</sup> Kelkaj gramatikoj (ekz. el la genera skolo de gramatikistoj) konsideras objekton kaj adjekton parto de predikato (Wells 1989:47). Tamen, la plej konataj esperantaj gramatikoj konsideras objekton kaj adjekton komplementoj de la predikato, do, ne ene de la predikato mem (Wennergren: 16; Kalocsay-Waringhien 1980: 54; PIV: "predikato"). Se tio povas kaŭzi problemojn al la lernantoj, anstataŭ "predikato" oni simple povas diri la esprimon "kerno de predikato" (aŭ tutsimple "verba parto") al la frazparto kiu enhavas la verbon.

<sup>9</sup> "Frazparto, kiu diras, en kiu maniero, en kiu loko, en kiu tempo, per kiu ilo ktp., okazas la ago (aŭ stato) de la predikato: *La hundo kuras **tre rapide**; Ili loĝas **en Londono**...*" (Wennergren 2010: 14)

<sup>10</sup> Wennergren (2010 ĉap.10) uzas la vorton *rolmontrilo* por nominativo, akuzativo kaj prepozicioj. Mi larĝigas tiun koncepton ĉi tie, por ke ĝi koncernu ankaŭ verbojn (do, la tipajn verbajn finaĵojn), kaj adverbajn frazpartojn. Fakte, Wennergren (2005:117) ja diras: "Iafoje E-vorto kunlaboras kun rolmontrilo tiel, ke la E-vorto ŝajnas esti rolmontrilo."

FRAZPARTA TIPO	ROLMONTRILO	EKZEMPLO	FRAZROLOJ
predikata	verba (finaĵoj -i, -is, -as, -os, -us, -u, kaj ankaŭ kelkaj participoj)	La knabo <b>manĝas</b> pomon.	predikato
akuzativa	n-finaĵo	La knabo manĝas <b>pomon</b> .	objekto, adjekto (tempopunkto, mezuro kaj movo), epiteto
prepozicia	prepozicio en la komenco de la frazparto	La knabo aĉetis frukton <b>en la najbara vilaĝo</b> .	adjekto
adverba	E-finaĵo, primitivaj adverboj	La knabo aĉetis frukton en la najbara vilaĝo <b>pasintsemajne / hieraŭ</b> .	adjekto
nominativa	ne estas rolmontrilo	<b>La knabo</b> manĝas pomon.	subjekto, subjekta kaj objekta predikativo, nominacio, vokativo, epiteto

Pro la fakto, ke adverbajn frazpartojn oni rajtas ŝanĝi akuzative aŭ prepozicie (pasintsemajne = la pasintan semajnon = en la pasinta semajno), kaj ke ofte oni rajtas ŝanĝi akuzativon prepozicie kaj inverse (Mi fidas **vin** = Mi fidas **je vi**), mi decidis grupigi tiujn tri tipojn (akuzativan, prepozician kaj adverbajn frazpartojn) en ununuran kategorion, kiun mi nomis Komplemento.

Tiamaniere, la helpilo bazita sur la *rolmontrilaj tipoj* havas nur tri elementojn<sup>11</sup>:

- Nominativa frazparto (aŭ Nominativo): subjekto, subjekta kaj objekta predikativo, vokativo kaj nominacio<sup>12</sup>.
- Predikata frazparto (aŭ Predikato): verbo, verboj kaj *nedisigeblaj adverboj*<sup>13</sup>.
- Komplementa frazparto (aŭ Komplemento<sup>14</sup>): objekto kaj adjekto.

<sup>11</sup> Mi konscias, ke tiuj tri nomoj ne apartenas al la sama kategorio, ĉar Predikato kaj Komplemento estas frazrojloj (fakte, Komplemento estas grupo de frazrojloj) kaj Nominativo, kvankam oni povas kompreni ĝin kiel grupon de frazrojloj, la nomo ne sugestas tion rekte. Bedaŭrinde, mi ne kapablis trovi pli taŭgajn etiketojn.

<sup>12</sup> Subjekta predikativo: *Tiu domo estas **alta***. Objekta predikativo: *Mi farbas la domon **blua***. Vokativo: ***Petro**, ĉu vi vidis la pilkon?* Nominacio: *Mi tre ŝatas la urbon **Prago***.

<sup>13</sup> Permesu al mi tiun "instruistan ruzaĵeton": *Nedisigeblaj adverboj* estus tiuj adverboj, kiujn oni ne rajtas disigi de la verbo, ekzemple: *tre, ege, multe, malmulte, tro, sufiĉe, nepre, tute, nur, nun, tuj, ne, preskaŭ...* La celo de tiu kategorio estas faciligi la Mansignadon, ĉar se ĉiun adverbajn ni mansignas kiel Komplementon, frazoj kiaj la jenaj estus malkomforte mansigneblaj:

*Mi tre ŝatas danci vespere. | Ŝi nur legas poezion.*

N K P K N K P K

Male, tiu kategorio rajtigas nin analizi la *nedisigeblajn adverbojn* kiel Predikaton:

*Mi tre ŝatas danci vespere. | Ŝi nur legas poezion.*

N P K N P K

<sup>14</sup> En ĉi tiu artikolo, mi skribas ĉiam tiujn nomojn pere de majuskla inicialo (Nominativo, Predikato, Komplemento) por diferencigi ilin de aliaj eblaj signifoj.

## Simplaj frazoj

Ni vidu simplan frazon:

La knabo	trinkas	bieron.
(subjekto) sen rolmontrilo	(verbo)	(objekto) akuzativo
Nominativo	Predikato	Komplemento

Pli komplikan frazon:

Morgaŭ matene	la granda knabo	trinkos	malvarman bieron	en vilaĝa trinkejo.
(tempa adjekto) adverba frazparto	(epiteto kaj subjekto)	(verbo)	(epiteto kaj objekto) akuzativo	(loka adjekto) prepozicia frazparto
Komplemento	Nominativo	Predikato	Komplemento	Komplemento

Nun, ni jam havas sufiĉe simplan sistemon (nur 3 elementojn!) kaj pro tio, ni povas uzi ĝin kiel taŭga helpilo. Tamen, tiaj sistemoj devas esti kompletaj, kaj tio signifas, ke krom manaj signoj, ĝi devas havi kaj voĉajn nomojn kaj skribajn ekvivalentojn por diri aŭ skribi ilin dum lernado kaj instruado<sup>15</sup>.

	Manaj signoj	Voĉaj signoj	Skribaj signoj	Frazroloj
<b>Nominativa frazparto</b>		Nominativo	N Nominativo  blua koloro	subjekto, subjekta kaj objekta predikativo, vokativo, nominacio epiteto
<b>Predikata frazparto</b>		Predikato	P Predikato  ruĝa koloro	predikato (verbo aŭ verboj kaj "nedisigeblaj adverboj"), participoj
<b>Komplementa frazparto</b>		Komplemento	K Komplemento  verda koloro	objekto, epiteto, adjektoj (akuzativaj, prepoziciaj kaj adverbaj)

**Nominativo:** ĝia kerno estas substantivo (aŭ pronomo) sen rolmontrilo, sed ĝi povas havi aldonaĵojn (*la granda **knabo**; la **kato** de mia fratino*). Dum la parolado, la tuta

<sup>15</sup> Koloroj utilas ankaŭ dum teksta analizado, ĉar oni povas substreki la frazpartojn pere de ili aŭ eĉ skribi tiujn frazpartojn laŭ tiuj koloroj.

frazparto devas esti dirita kune kun ĝia mansigno. Do, la mansigno de la kerno (*knabo; kato*) ĉefrolas la tutan frazparton.




**Predikato:** ĝia kerno estas verbo, sed povas esti du verboj (kaze de modalaj verboj: *devas esti, volas veni, proponas aĉeti...*) kaj ankaŭ la menciitaj *nedisigeblaj adverboj* (*tre ŝatas; ne scias*). Adjektivaj kaj adverbaj participoj povas ankaŭ roli kiel predikato (*Trinkante bieron, ili babilis ĝis noktomezo.*)<sup>16</sup>






**Komplemento:** temas pri rolmontrilaj frazpartoj (pere de N-finaĵo aŭ prepozicio) kaj disigeblaj adverbaj frazpartoj (*morgaŭ matene*).

Tiuj proponitaj manaj signoj estas sufiĉe naturaj signoj, kiujn oni povas facile rilati al la ĉefaj roloj (subjekto, predikato kaj objekto/adjekto). Aldone, ili komforte sekvas la plej naturan frazordon en Esperanto (N P K). Taŭgas, ke ne tiel naturaj frazordoj havas ankaŭ ne tiel naturan signordon.

Kompreneble, la mansignoj mem povus esti aliaj. Tamen estas interese, ke ili ne estu tro artefaritaj, kvazaŭ la signoj tute spontanee kaj nerimarkite substrekus la paroladon.<sup>17</sup>

Do, la antaŭajn ekzemplojn oni mansignas tiel:

La knabo	trinkas	bieron
		
N	P	K

Morgaŭ matene	la granda knabo	trinkos	malvarman bieron	en vilaĝa trinkejo.
				
K	N	P	K	K

Kiam estas du aŭ pli sinsekvaj Komplementaj frazpartoj, la mansignon oni devas ripeti per eta movo. Same, se temas pri du sinsekvaj nominativaj frazpartoj aŭ (pli malfacile) du sinsekvaj predikataj frazpartoj.

Tiu ĉi helpilo, ne havas propran signon por indiki komencon de nova frazo. Por

<sup>16</sup> "Participo kun E-finaĵo montras kroman agon, kiu rilatas al la subjekto de la frazo. Anstataŭ diri du frazojn, unu por ĉiu ago, oni kunmetas la frazojn al unu." (Wennergren 2010:138).

Fakte, ankaŭ adjektiva participo povas agi same, kiel okazas en tiaj esprimoj: *Li estis skribanta la leteron kiam...*, aŭ kiel en tiu poemo de Ragnarsson (2008:17 *saluto surstrate*): "Saluto juna / de nova patrino / ĉareton puŝanta / tra pluvo aŭtuna...", ĉi tie, "puŝanta" agas kiel predikato de subfrazo kaj "ĉareton" estas ĝia rekta objekto. Tiu participo anstataŭas la duan frazon (Saluto juna de nova patrino, kiu estis puŝanta ĉareton...)

<sup>17</sup> En rilata [filmeto](#) oni povas vidi, kiel tiu helpilo funkcias.








pliklarigi la aferon, oni sugestis al mi, ke ambaŭ manoj alternu. Sed, tio ŝajnas al mi aldona komplikaĵo, kiu eble estas nenecesa. Eble klara manmovo, indikanta novan frazon, sufiĉas.

## Pli komplikaj frazoj

Kiam estas subfrazoj, la mansignado komenciĝas denove kun ĉiu subfrazo. Do, tiu helpilo ne celas hierarĥikan analizadon de frazoj kaj subfrazoj.<sup>18</sup>

Ekzemple:

La knabo	nepre volas,	ke la amikino	dancu	tangon.
				
N	P	N	P	K







Partikuloj, kiuj utilas por komenci novan frazon aŭ subfrazon (tabelvortoj, konjunkcioj, subjunkcioj, kaj kelkaj prepozicioj) estas aldoneblaj al la sekva frazparto: *kiu, kiuj, kaj, sed, ĉar, ke, por, por ke...*

Kiam la predikato havas du verbojn ("volas danci", "devas iri", "bezonas trinki") fakte tiu dua verbo (en infinitivo) estas la rekta objekto de la unua. Tamen, samtempe, ĝi estas la verbo de la sekva frazparto, kiu agas kiel ĝia komplemento. Por plifaciligi la mansignadon, mi preferas, ke la lernantoj mansignu tiun dua verbo kiel Predikato:

Mi	volas danci	tangon	en la salono.
			
N	P	K	K

Tamen, se oni emas esti pli fidela al gramatiko, ankaŭ eblas komplikigi iomete la aferon farante duoblan signon: unue, dirante "danci" oni mansignas Komplementon, sed tuj oni ŝanĝu la signon al Predikato, ĉar komencas subfrazon regitan per tiu dua verbo:

<sup>18</sup> Tamen, oni facile povus mansigni subfrazon iomete pli alte (aŭ malalte, se oni sekvas la etimologion de *sub-frazo*) aŭ fore por indiki tion, kaj reveni al la kutima loko, kiam nova ĉefrazo komenciĝas. En tiu ekzemplo, la subfrazo (*ke la amikino dancu tangon*) rolas kiel rekta objekto de la verbo de la ĉefrazo. Sed se ni mansignus ĝin kiel Komplemento, ni kontraŭus la ĉefan celon de tiu helpilo: helpi la regadon de rolmontriloj.

Mi	volas danci	tangon	en la salono.
	  		
N	P	K	K

Laŭ tiu pli komplika mansignado, oni ankaŭ povus indiki tiujn subfrazojn, kiuj agas kiel rekta objekto: la vorteton *ke* oni povas mansigni kiel Komplementon (por indiki, ke la frazo per ĝi enkondukita havas tiun rolon) kaj tuj mansigni kiel kutime la subfrazon:

La knabo	volas,	ke	la amikino	dancu	tangon.
					
N	P	K	N	P	K

Alia komplika frazo okazas, kiam verbo en infinitivo rolas kiel subjekto de la frazo. Ĉi kaze, oni devas mansigni tiun verbon, kaj ties frazparton, kiel Nominativo:

Resti kun leono	estas	dangere.
		
N	P	K

## Avantaĝoj de tiu helpilo

Krom la ĝeneralaj avantaĝoj detiaj helpiloj, kiujn mi jam menciis en la enkonduka parto de ĉi tiu artikolo, mi volas aldoni, ke kiam la lernanto jam ĝin regas, ĝi povas esti speciale utila en la sekvaj situacioj:

**Memorigilo por ne forgesi rolmontrilon**, ĉar kiam lernanto diras frazparton dum faras la mansignon *K* (Komplemento), li jam scias, ke temas pri N-finaĵo aŭ frazparto prepozicia aŭ adverba. Eĉ kiam li eraras, li tuj konscias pri tio (ĉar ne kongruas la mansigno kun la rolmontrilo) kaj tiamaniere li mem povas korekti la eraron.

**Aŭtomatigo** de mansignoj kaj parolado en la plej kutimaj frazoj<sup>19</sup>:

<sup>19</sup> MacGill (2005: 107) tre bone konscias pri la aŭtomatigo de tiaj rilatoj: "Preskaŭ senescepte, esperantaj verboj havas difinitan transitivo-staton. Kiam oni instruas aŭ lernas verbon, estas esence, ke oni samtempe lern(ig)u ties kategorion. Lerniloj kaj lernigantoj devas prezentadi verbojn en siaj minimumaj kunteksto: Manĝas -ON, vidas -ON, komencas -ON, sed okazas -O, mankas -O, k.s.". Mi aldonus, ke pere de tiuj mansignoj, tiu rilato multe plifortiĝus.

La sago	trafis	la koron.
N	P	K

Tiu strukturo povas plilongiĝi sen kompliki la samtempan analizadon:

La akra sago	trafis	la kompatindan koron.
N	P	K

La akra kaj longa sago	trafis	la kompatindan koron,	hieraŭ vespere.
N	P	K	K

La konstanta (aŭ almenaŭ tre ofta) samtempa uzado inter parolado kaj mansignado helpas la aŭtomatigadon. Post kelka praktiko estas pli malfacile ne diri la N-finaĵon, kiam oni mansignas Komplementon en tiaj frazoj.

Inter la plej kutimaj frazoj, estas ankaŭ la subjektpredikativaj frazoj:

La knabo	estas	maldeca.
N	P	N

Rimarku, ke nun, la vorto "maldeca" estas nominativa (ne havas rolmontrilon) sed ne agas kiel subjekto (la adjektivo ne estas komplemento kun rolmontrilo, ĉar pere de la verbo, rilatas rekte al la subjekto, do, nominativo).

Sammaniere, la ofta samtempa ripetado de la mansignoj (N P N) helpas la aŭtomatigadon. En tiaj frazoj, la kopulo ("esti")<sup>20</sup> estas nura ligo inter la subjekto kaj sia priskribo, do "maldeca" ne agas kiel komplemento sed kiel (preskaŭ) adjektivo de la subjekto. Aliaj verboj agas same (*ŝajni, iĝi, fariĝi, montriĝi, evidentiĝi*).

**Ĝi helpas ne meti N-finaĵon kiam tio ne taŭgas.** Estas kelkaj verboj, kiujn kutime oni diras antaŭ la subjekto, kiuj ofte erarigas la lernantojn: \*Aperis knabon; \*Okazis akcidenton; \*Mankas monon<sup>21</sup>.

Estas pli malfacile erari pere de tiu mansigna helpilo, ĉar la lernanto tuj rimarkas, ke aldonante N-finaĵon ne estus subjekto en la frazo (ĉar mankas la mansigno Nominativo).

Aperis	knabo.	Okazis	akcidento.	Mankas	mono.
P	N	P	N	P	N

**Ĝi helpas la komprenon de pli malfacilaj frazoj.** Objektan predikativon oni

<sup>20</sup> Sed ne ĉiam "esti" agas tiel. Kiam ĝi semantike similas al "okazi" aŭ al "troviĝi", funkcias alimaniere, kiel verbo kun komplemento (adjekto): "la koncerto estos je la naŭa vespere", "Nitra estas en Slovakio", do ni mansignas tiajn frazojn: N P K.

<sup>21</sup> Kutime temas pri netransitivaj verboj. Wells (1989: 42) faras interesan rimarkon tiurilate: "...Petro malaperis. Tie ni havas nur du frazelementojn, S kaj V; kaj en Esperanto ilia ordo estas libera, kvankam dominante S+V. La alian ordon, V+S, ni uzas precipe kiam la verbo estas mallonga kaj la subjekto longa: *Malaperis tiu stranga viro kun nigra ĉapelo.*"

mansignas kiel Nominativon (ne estas rolmontrilo), dum epiteton de objekto oni mansignas kiel Komplementon (ĝi rilatas al la objekto, kiu ja havas rolmontrilon). Kompreneble, ne necesas instrui tiujn teknikajn vortojn al la lernantoj, sed ili ja devas konscii, ke la signifo malsamas.

Mi	farbas	la domon bluan.
N	P	K

Mi	farbas	la domon	blua.
N	P	K	N

Alia simila ekzemplo:

Mi	elektis	lin	kiel prezidanton.
N	P	K	K

*Li* estas prezidanto, *mi* elektis *lin*, por ke *li* estu prezidanto. Farante la saman signon por *lin* kaj por *kiel prezidanton* helpas la pli bonan komprenon de la frazo.

Mi	elektis	lin	kiel prezidanto.
N	P	K	N

*Mi* estas prezidanto, kaj kiel prezidanto, *mi* elektas *lin*. Farante la saman signon por *Mi* kaj por *kiel prezidanto* helpas la pli bonan komprenadon de la frazo.

**Ĝi ebligas la instruistan kontrolon dum tutgrupa laboro.** En tutgrupa laboro estas malfacile rimarki, ĉu iu diras aŭ forgesas la N-finaĵojn. Sed per tiu helpilo, la instruisto povas kontroli grupe, ĉar lernanto, kiu en grupo mansignas malsame ol la aliaj, baldaŭ estas malkovrota.

**Ĝi ebligas la kontrolon inter la lernantoj en grupa kaj para laboro.** Lernantoj povas helpi unu la alian. Se iu eraras, ne temas nur pri aldoni N-finaĵon, ekzemple, sed pri korekti la eraron de frazanalizado<sup>22</sup>.

**Ĝi helpas la korektadon de teksto,** ĉar legi (propran) tekston pere de tiuj mansignoj signifas fari tujan analizon de la frazo, kaj tiu analizo estas bonega helpo por malkovri erarojn. Tian korektadon oni povas fari per mansignoj aŭ per kolora substrekado.

**Ĝi helpas la bonan uzadon de *sia*.** Sufiĉas, ke la lernanto sciu, ke la pronomo *sia* ne devas esti uzata en Nominativa frazparto<sup>23</sup>.

La knabo	legas	sian libron.
N	P	K

<sup>22</sup> Kutime, lernanto ne simple forgesas la N-finaĵon, li forgesas analizi la frazon, aŭ analizas ĝin malbone.

<sup>23</sup> Kurioze, tiu ĉi frazo estas escepto, ĉar *sia* (el "la pronomo *sia*") rolas kiel nominacio. Alia escepto estas kiam tiu pronomo estas en subjektpredikativa frazparto ("Evidenta karakterizo de vegetaĵaro estas **sia** tri-dimensia strukturo, foje nomata fizionomio, aŭ arkitekturo."; "Karlo mem estas **sia** plej bona amiko")

La edzo kaj lia(*) edzino	iras	en sian hejmon.
N	P	K

(\*) ĉi tie ne eblas uzi la pronomon *sia*, ĉar temas pri nominativa frazparto.

**Ĝi ebligas interesajn ekzercojn neniam faritajn.** Instruisto diras frazon kaj petas siajn lernantojn, ripeti ĝin pere de mansignado. Do ne temas pri nura ripetado sed pri ripetado kun samtempa analizado.

Variaĵo 1: la donita frazo estas nur ŝablona frazmodelo, pere de kiu, la lernanto devas krei novan frazon anstataŭigante vortojn.

Variaĵo 2: tiu mansigna analizado ebligas la instruiston doni instrukciojn, ekzemple, pri frazordo. Imagu, ke estas frazo en la tabulo (aŭ frazo ĵus dirita):

*La lernantoj tro ĝenas la instruiston.*

Tiam la instruisto mansignas K P N, kaj la lernantoj tutgrupe devas ripeti la frazon, laŭ la nova ordo:

La instruiston	tro ĝenas	la lernantoj.
K	P	N

Instruisto povas ankaŭ helpi dubeman lernanton aŭ korekti erarojn simple mansignante (ne necesas paroli, nek skribi sur la tabulon). Se lernanto parolas sen mansignado kaj eraras, la instruisto nur devas moveti sian manon kaj la lernanto tuj rimarkas, ke li eraris kaj li mem korektas sian frazon.

## Kion mi petas al vi?

Diskuti, taksu tiun helpilon, kaj helpi min solvi la jenajn flankojn:

- ĝenerala plibonigado
- korekti erarojn (mi ne estas gramatikisto)
- korekti kaj solvi dubojn pri kelkaj frazpartetoj (bonvolu vidi la [ekzemplajn tekstojn](#))
- precizigi kiam oni devas enkonduki tiun helpilon (en kiu momento de la lernado), kaj kiam ĝi devas esti forlasita (mi enkondukas ĝin jam en la dua leciono por komencantoj)<sup>24</sup>
- se eblas, apliki ĝin kaj komenti problemojn, rezultojn, ktp.
- mi ne scias, ĉu tiu helpilo povas taŭgi por tiuj, kiuj ja denaskparolas kazajn lingvojn (tamen, dum Somera Esperanto-Studado 2013, agante kiel helpinstruisto, mi rimarkis, ke denaskaj parolantoj de slavaj lingvoj ankaŭ forgesas la N-finaĵon sufiĉe ofte).
- mi ne scias, ĉu tiu helpilo taŭgas por infanoj
- mi ne scias, ĉu tiu helpilo taŭgas por progresantoj (progresintoj, progresontoj?), ĉar ĝia aplikado, unue povus esti ĝena aŭ malkomforta
- mi ne scias, ĉu tiu helpilo povas helpi pli bone regi la esperantan interpunkcion

---

<sup>24</sup> Tiu helpilo estis uzata dum la kurso 2012-13 en grupo de komencantoj en Barcelono. La helpilo montriĝis tre utila. Mi denove uzas ĝin en la kurso 2013-14, eĉ pli memfide kaj sisteme.

## Literaturo

KALOCSAY, Kálmán. WARINGHIEN, Gaston. 1980. *Plena Analiza Gramatiko de Esperanto*. 4a eld. Rotterdam.

MacGILL, Stefan. 2005. "Verboj en Esperanto". En KOVÁTS, Katalin (red.). *Manlibro pri Instruado de Esperanto*. Partizánske.

RAGNARSSON, Baldur. 2008. *La neceso akceptebla*. Novjorko.

WELLS, John. 1989. *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto*. Rotterdam.

WENNERGREN, Bertilo. 2005. *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko*. Versio 14.0. Reta eldono: [www.bertilow.com/pmeg/](http://www.bertilow.com/pmeg/)

WENNERGREN, Bertilo. 2010. *Detala gramatiko*. Partizánske. ([PDF-versio](#))  
*Esperanta Vikipedio*. "[Solfeĝo](#)"

*Plena Ilustrita Vortaro* (reta versio 2012). "[predikato](#)"

Viktoro Solé

1.2 dua versio: mallongigo kaj kelkaj ŝanĝoj (aŭgusto 2013)

1.3 tria versio: lingvaj eraroj korektitaj, teoriaj sugestoj aplikitaj (aŭgusto 2013)

1.4 kvara versio: aldono de subĉapitro "Pli komplikaj frazoj" (novembro 2013)

Skizo de tiu artikolo estis prezentita, kiel prelego en:

- Somera Esperanto-Studado en Nitra (Slovakio, julio 2012).
- Somera Esperanto-Studado en Martin (Slovakio, julio 2013)
- 36a Kataluna Kongreso de Esperanto kaj 1a Okcitana Kongreso de Esperanto en Salardú (Arana Valo, novembro 2013)

[Mansignado por Esperanto](#): en tiu ĉi retpaĝo vi povos spekti komplementan filmeton kaj ekzemplajn tekstojn, eĉ vi povos publikigi viajn komentojn.

[v.sole@esperanto.cat](mailto:v.sole@esperanto.cat)

Mi tre dankas al Xavier Alcalde, Xosé Conde, Saioa Escobar, Márta Kovács, Katalin Kováts, Maria Majerczak, Ramon Perera kaj Antonio Valén, pro iliaj trafaj sugestoj.